

Vladimír Dvořák prezentis laboron de la Komitato, Pavla Dvořáková plenumadon de prioritatoj kaj la raporton pri la agado de nia asocio ekde la lasta konferenco. Poste Vratislav Hirš informis pri la asociaj financoj kaj Petr Chrdle pri rektaj membroj de UEA.

Post mallonga paŭzo kun violonado de Jan Duda estis pritraktitaj ŝanĝoj en la asocia statuto.



Sabata posttagmezo estis dediĉita al promeno tra la urbo kun s-ro Skalický el la Urba Muzeo. La promeno preter la urba teatro, preĝejo de Ĉieliro de Virgulino Maria (tie Miroslav Smyčka kantis psalmon de Antonín Dvořák) kaj tra la urba placo finiĝis en la Urba Muzeo, kie antaŭ la trarigardo de la kolektoj okazis mallonga renkontiĝo kun poetino Věra Ludíková, Esperanto-amikino naskiĝinta en Ústí nad Orlicí.



Antaŭ la vespermanĝo inĝ. Ján Vajs el Slovakio informis pri preparoj de la 101-a UK en Nitra 2016 kaj geedzoj

Dvořák prezentis planojn pri 5-taga oficiala Antaŭkongresa ekskurso. Pluraj ĉeestantoj tuj aliĝis kiel helpantoj, ĉiuj ricevis propagandajn materialojn.



Post la vespermanĝo nevidanta s-ro Jan Příborský prelegis, kial nevidantoj amas vojaĝadon, kvankam ili povas ĝui ĉion nur per palpado, flaro kaj priskribo de amikoj. La nevidanta muzik-instruisto Jiří Jelínek prezentis plurajn koncertaĵojn por gitaro kaj akompanis kantadon de sia edzino Milena. La reston de la vespero plenigis danc-amuzo (unu kantisto kun elektronika orgeno) kaj tombolo.

La dimanĉa antaŭtagmezo alportis kelkajn informojn, ekz. pri esperantigado de la retejo VEDEM pri judaj infanoj en la geto de Terezín dum la militaj jaroj (<http://www.vedem-terezin.cz/eo/>), tamen la ĉefa programo de la traktado estis kadra laborplano, redaktado de la Regularo pri asociaj elektoj kaj de la Kongresa Rezolucio.

Miroslav Malovec

fotoj:

Pavla Dvořáková


Libuše Dvořáková

O.A.Fischer

Jaroslav Liška

Elŝuteblajn fotojn el la kongreso vi povas trovi en

www.muzeum.esperanto.cz/cs/galerie.



La plej juna partoprenanto